

Antologio XVIII

Gyula-Julio Baghy

Hungara Esperanto-poeto

En Svislando (1926)

Esperanto (UEA)

Originala teksto (en Esperanto):

En Svislando

Gigantaj montoj la ĉielon erpas,
terkoron sondas fundo de la lag'.
Unua sunradian benon ĉerpas,
la dua freŝan forton por la tag'.
Konkordon kreas tie en tri gentoj
majesta kunlaboro de l' natur'
kaj paco vivas sub la domtegmento,
okuloj brilas pro l' ankora pur'.

Miraklojn miras mi, la vagabondo.
Ne mont' nek lago tuŝas min ĉe l' kor',
mi vidis tiajn ofte en la mondo,
alia estas tie la trezor':
mizer' ne plendas, virto sin ne vendas,
infan' ne ploras pro la mank' de pan',
hontgroŝojn sur la strato ne atendas
soldato blinda kun senfingra man'.

Ho di-benita lando de l' prudento,
homecon vian gardu kun ĵaluz',
modelo restu vi por ĉiu gento,
evitu reton de l' milita ruz',
por ke se nove flagros venĝoflamo,
blasfemos veoj, fluos sangofont',
eĉ tiam restu *unu land' de l' amo*
por trovi ie *fidon* pri l' estont' !

Antologio XIX

Eduard Stettler

Honora prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Hector Hodler – lia vivo kaj lia verko (1928)

Enkonduko:

La nomo de Hector Hodler (1887-1920), la fondinto aŭ kunfondinto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Ĝenevo, estas konata verŝajne al ĉiu e-isto, kiu okupiĝas pri la historio de la Eo-movado. Malpli konataj estas lia agado, lia pensmaniero kaj liaj brilaj artikoloj, kiuj aperis en la centra revuo *Esperanto*. Ĉar Hodler mortis jam en 1920, la postaj generacioj iom forgesis lin kaj li mem fariĝis Eo-legendo.

La konata svisa e-isto kaj proksima kunlaborinto de Hodler, Eduard Stettler (1880-1940), postlasis al ni, pere de sia libreto *Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko* (UEA 1928), unikan ateston, kiu dokumentas la vivon, laboron kaj mentalecon de Hector Hodler. Lian mallongan vivon Stettler pritaksis kaj feliĉa kaj tragika. Stettler estis vicdirektoro (1910/11-19), direktoro kaj fine prezidanto (1920-24 kaj 1928-34) de Universala Esperanto-Asocio, kiu nomis lin honora prezidanto.

Certe la persona karaktero de Hodler esence kontribuis al lia decido starigi gravan organizaĵon e-istan, kiu ekzistas ĝis hodiaŭ, eĉ se post Hodler aliaj homoj reformis ĝin.

Sekvas la plej legindaj ĉerpaĵoj el la menciita libreto de Stettler. Ĉi tiu klasika teksto de 1928, kiu jam delonge ne plu estas trovebla en libroservoj, sendube devus esti rehavigita al la e-istaro kiel represaĵo kun la necesaj komentoj historiaj kaj biografiaj.

Originala teksto (en Esperanto):

En 1887, kiam la pentristo [Ferdinand] Hodler staris meze en la malfacilaĵoj de la vivo, baraktante pri arto kaj ekzisteblecoj, naskiĝis la 1-an de Oktobro lia filo, *Hector*, Ferdinand. La patrino, nask. Augustine Dupin, estis Ĝenevanino. La malgranda familio loĝis ie ajn en modesta kvartalo, pliposte okazis malinterkonsentoj inter la gepatroj. Plimulte mi ne scias; la silenta Hodler, kaj tio estas forta trajto de lia karaktero, neniam parolis pri siaj intimaj aferoj nek esploris tiujn de la aliaj. Eĉ kiam mortis lia patrino, 1910, li diris preskaŭ nenion, sed ni ĉiuj en la oficejo, vidante tiun viran junulon, kiel li trapaŝis la ĉambron, la larmojn en la okuloj, kiel li laboregis por forgesigi la akran doloron, ni sentis la tutan forton de l'amo lin liganta al la kara patrino. En ŝi li perdis la malmultan lumon de sia juneco. Liajn knabajn jarojn priskribis

S-ro Edm. Privat en , ‘Esperanto’ tiel bone, ke mi permesas al mi represi la koncernan parton. „Kiam mi dekdujare eniris gimnazion”, diras S-ro Privat, „mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj, kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l’patro. Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector Hodler malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo. Dum tiu turmento li kutimiĝis je pensado. Tiam li lernis tiun silentemon kaj trankvilecon, kiuj kaŝis sub iom nevarma eksteriĝo la plej senteman koron kaj fervoran animon.

Kiam la patro ne bezonis lin, ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabetoj pri la profundaj misteroj de l’socia vivo. Li estis la pli saĝa kaj la pli multscia. Dekdujare li jam legis la tutan Zola!

Unu tagon en 1903 mi alportis en klason esperantan gramatikon. «Ankaŭ mi jam eklernis la lingvon», li respondis kun brilo en la okuloj. Post tri semajnoj ni jam flue interparolis en la nova lingvo kaj decidis fondi klubon kaj ĵurnaleton: ‘Juna Esperantisto’. Unu post unu vendiĝis niaj belaj premilibroj aŭ volumoj de Jules Verne por pagi la eldonelspezojn. La redakcio sidis dum kvin jaroj sur la sama benko en la fundo de klaso. Dum kiom da lecionoj pri matematiko ni gluis poŝtmarkojn, skribis adresojn aŭ legadis patrajn leterojn de profesoro Cart aŭ D-ro Zamenhof!

Hodler jam montris ŝaton je ordo kaj serioza organizo. Ankaŭ li vidigis senpartian ekvilibron. Laŭ lia instigo ni lernis kune ‘Idiom Neutral’ kaj ‘Bolak’, por certiĝi, ke Esperanto estas ja vere la plej taŭga lingvo internacia.

La organizo de la Dua Kongreso (Ĝenevo 1906) alporlis novajn spertojn. Hodler speciale interesiĝis je la proponoj de S-roj Rousseau kaj Carles pri esperantistaj konsuloj. Li insistis pri tio, ke nia movado devas stariĝi sur fundamento samtempe pli idealista kaj pli praktika, organizante reciproke sinhelpadon inter bonvolaj homoj. Igi la lingvon tuj utila kaj prepari internacian tuthomaran popolon, jen la temo, kiun pristudis lia pensema inteligento. En 1907 la gazeton ‘Esperanto’ li reprenis el la manoj de Paul Berthelot kaj redaktis ĝin laŭ tiu tendenco.”

Tiu Ĝeneva Kongreso fiksas la sorton de Hodler. Ne fininte la gimnazion li forlasis la benkojn de la lernejo por neniam revidi tian institucion, kaj eniris sanktan Esperantujon. (...)

Hodler vidis grande, li volis realigi la ideojn de Zamenhof per la praktiko, dum S-ro de Saussure interesis tiam kiel ĉiam detaloj de la lingvo kaj gramatiko. Ankaŭ ĉi tiu havis multan metodon en la laboro kaj bonordegon en la oficejo, bonecoj, kiujn juna Hodler devis lerni. (...)

Neniam mi forgesos, kian elokventecon mi devis amasigi, ĝis Hodler elpoŝigis tutajn kvin frankojn por aĉeto de kelkaj plumoj, de kaslibro kaj de unu rekta liniilo. (...)

Kun malofta klareco la 19-jara junulo, neniam estinte vere juna, nun disvolvas sian programon, al kies ĉefaj ideoj li restos fidela dumvive. Sed kiom li trompis sin pri la malapero de la ‘administrata aferoj’, t. e. la zorgoj pri la mono. Ili nur komencis, por grandiĝi ĉiujare ĝis la helpo de lia patro lin malŝarĝigis. Fondinto de la gazeto estis S-ro Berthelot, kaj li aŭ ebla posteulo vendis la gazeton, post ŝajne malbonaj spertoj, al Hodler, kontraŭ kelkaj penplene de li ŝparitaj centfrankoj. (...)

(...) Post multaj penoj Hodler albordiĝas ĉe la presejo Büchler en Bern, kie aperas la unua numero [de 'Esperanto'] dum Januaro 1918. (...) Kun S-ro Büchler, la specialisto por societaj ĵurnaloj, 'Esperanto' ĉiam restis en plej bonaj rilatoj. Okaze de la morto de Hodler, la presejestro funebris kun ni dirante: „Mi vidis lin nur unu fojon, sed malmultajn homojn mi lernis altestimi kiel lin. Unu post la alia niaj naciaj kaj internaciaj bultenoj malaperis dum la milito, sed ĉiam alvenis la manuskriptoj por 'Esperanto', en ordo malofta, konsciencie korektitaj per tiu manskribo firma kaj bela, kiu neniel divenigis lian malsanon. Devis esti homo je energio kaj konscienco eksterordinaraj.“

Eksterordinara restas, kiom la multokupita Direktoro de UEA laboris por sia gazeto. Pli ol dektri jarojn (escepte 6 monatojn dum 1914) li aperigis ĝin regule kiel horloĝon; malmultaj estas la numeroj sen unu el liaj rimarkindaj artikoloj, aŭ tradukoj de li modeste signitaj: A. R. (...). Multe ĉagrenis lin la malregulaĵoj de la poŝta servo (...). Iun tagon, kiam ni kune prenis la kutiman nigran kafon, li pagis por ambaŭ, kun la akra rimarko: „Ni volas fortrinki hodiaŭ la netan profiton de mia ĵurnalo.“ (...)

Malgraŭ la malmultaj dokumentoj en miaj manoj, — Hodler ne estis kolektanto de io ajn — mi pritraktis tiun interesan periodon iom detale, tiel por ke lia rolo ekvidiĝu el la faktoj, kiel ĉar la tiam prikonsideritaj problemoj konservis ĝis hodiaŭ sian gravecon. (...)

Hodler priskribis sian propran rolon en 'Esperanto', Aprilo 1918, dirante: „Ni spertis, ke la pure predikema propagando ne sufiĉas: post nedaŭra entuziasmo multaj varbitoj forlasos nian aferon, ĉar ili ne scias tiri ian utilon el Esperanto. — Fine, aliĝinte al Esperanto precipe ĉar ni vidis en ĝi efikan ilon por la alproksimigo de la popoloj kaj ilia paca kunlaboro, ni opiniis, ke ankaŭ en tiu rilato internacia organizaĵo sur neŭtrala fundamento de esperantismo povas ludi utilan rolon.“

Mi ne kredas trograndigi dirante, ke la merito de Hodler konsistis en tio, ke li sciis kunigi sub unu tegmento la diversajn proponojn kaj provojn de praktika agado: ke per siaj belaj artikoloj li vekis la energion de la esperantistoj; kaj ke li donis al tiu nova organizo altan celon: „Krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj“. (...)

La plimulto de la esperantistoj ĝojis pri tiu bela nova entrepreno; „sed“, kiel skribas Hodler, „ĉe kelkaj tiamaj gvidantoj de nia movado ĝi vekis nur tre moderan entuziasmon. Iuj timis, ke tiu nova organizaĵo sin okupos pri lingvaj demandoj; aliaj, ke ĝi volas direkti la propagandon kaj anstataŭi la ekzistantajn societojn; iuj, ke ĝi konkurencos la naciajn societojn; aliaj, ke ĝi estas kreaĵo de senaŭtoritataj junuloj (prava riproĉo!) ktp. Mi memoras, ke tiama 'eminentulo' eĉ intencis sendi al mi serion de artikoloj por pruvi, ke tia organizaĵo estas tute neebla. — Unuvorte, ni renkontis ĉe kelkaj gvidantoj tiun saman rutinon, kiujn ili riproĉas al la kontraŭuloj de nia afero. Anstataŭ polemikadi, ni juĝis pli saĝe iri antaŭen kun tiuj, kiuj komprenis kaj fidis nin. Respondo per faktoj estas ĉiam pli konvinkiga ol respondo per teoriaj artikoloj.“ (...)

Por tia entreprenego dekduo da oficistoj estus ĝuste sufiĉintaj. Kion mi trovis alveninte en Ĝenevo por helpi Hodler-on? Ĉambro-keston malgrandan, je ordo kaj pureco en miaj okuloj dubaj, kun kelkaj krudaj abiaj tabloj kaj bretaro laŭlonge de unu muro. Ĉe la fenestro Hodler; unu oficisto rusa, inteligenta kaj malordema; en la malantaŭa fundo du pliaj samideanoj, ne forigeblaj eternaj vizitantoj, kiuj per ĉiama babilado supozeble kredis inspiri la oficejon. (...)

Kelkajn monatojn poste, en Rue de la Bourse, la oficejo jam aspektis pli oficeje, dank' al skribmaŝino, malnovaj mebloj donacitaj kaj novaj bretaroj nepentritaj. La malfermo konsistis en plenkora ridego pri komercojagisto nin honoriganta je sia vizito la unuan tagon: la malfeliĉulo tiom serioze kaj elokvente rekomendis ferajn monŝrankojn en ĉiuj grandoj, garantiitaj per atestoj de bankoj. ke li ne ekkomprenis nian ĝojon.

Alvenis pliaj oficistoj, bonaj kaj malbonaj, honestaj kaj aliaj, ĉiam tre malalte pagitaj, ĉiam nesufiĉaj laŭ nombro. Laboris ili, laboregis Hodler, tamen la tro bela konstruaĵo estus disfalinta sen la radikalaj ŝanĝoj de la organizo kaj labormetodoj, entreprenitaj kiam jam aŭdiĝis la krakado de la surŝarĝitaj traboj. (...)

Sed kun la grandiganta sperto ĉiam pli kreskis ĉe Hodler saĝa atento, ne entrepreni pli multe ol estis efektivebla. (...)

La militeksplodo, surprizinte la asocion en plena agado por la 'Deka', efikis la subitan foriron de la plimultaj oficistoj. Tuj Hodler alkuris. Ne esploru kun kiaj sentoj li denove okupis sin pri administraĵoj, penado lin tiom suferiginta multajn antaŭajn jarojn, ke li malamis ĝin pli kaj pli. Li sukcesis starigi servon por interŝanĝado de leteroj, kiu favore konatigis la oficejon kaj alportis al la kaso belan enspezon de respondkuponoj. (...)

La plia trankvilo en la agado de UEA permesis al Hodler koncentrigi siajn pensojn al la interŝtataj problemoj, kies teruran gravecon konfirmis la ĉiutagaj novaĵoj el la batalkampoj. Komencis [sic!], se la esprimo estas permesata, lia 'sciencia periodo'. (...) Dek jarojn poste oni estus tiurilate lin ne plu rekoninta. Havante pruvojn en manoj, mi pretendas, ke je la fino de sia mallonga vivo Hodler estus povinta taŭge plenumi oficon de privat-docento por siaj aferoj. Ne nur li legis, inteligente legis, amason da gazetoj kaj revuoj, sed kiel abonanto al diversaj bibliotekoj li trastudis multajn volumojn pri historio, ŝtataj aferoj, socia agado, psikologio ktp. (...). Li ankaŭ legis kaj komprenigis sin en itala lingvo, iomete konis la anglan, kaj pro plezuro ekstudis eĉ la rusan alfabeton.

Dum 1915 mi vidis lin diktantan sciencan tezon. Leviĝis la vualo, kiam en 1916 li sendis al ekzameno maŝinskriban verkaĵon je 378 paĝoj, prespretan, sed sen titolo. Estas forte dokumentita kaj pripensita franclingva traktaĵo pri paca organizo de la popoloj. Ĝiaj kvar partoj nomiĝas: La problemoj; la solvoj de la pacifistoj; la solvoj de la federalistoj; la metodo, kiun lasta parto finas per ĉapitroj: la nova idealo, la nova agado, la packontrakto. En la komenco li deklaras, ke tiu verko ne rilatas al la milito, ĉar kiel ajn ĝi finos [sic!], kiaj estis la personaj respondecoj de diversaj ŝtatestroj, „la ĉefa kulpulo estas la internacia anarĥia malordo de kiu la milito estas neapartigebla. Kiel malmoralaj, kiel senigataj je konscienco estis certaj politikistoj, ili ne estus povintaj malutili, se la civilizita mondo estus organizita favore de l'paco anstataŭ por la milito.“

Havinte la malgajan taskon travidi la multajn manuskriptojn de la kara mortinto, mi trovis plurajn eldonojn de tiu verko, kies perfektigo lin multe okupis. Bedaŭrinde ĝi aperis dum malfavora epoko. Francio, meze en la milito, havis taskojn pli urĝajn, kaj la francvisaj eldonistoj tro dependis de la franca legantaro por riski la elspezojn de la presado. Ankaŭ la nomo de Hodler estis tro malmulte konata ĉe la granda publiko. Ŝatis lin multe kelkaj internaciaj societoj, al kiuj li liveris okaze artikolojn, sed sian vivon li

estis plene dediĉinta al Esperanto, kie ne amasiĝas laŭroj. Kiam li ankoraŭ traktadis kun libristoj, jam venis la unuaj proponoj de prezidanto Wilson, fortirantaj la atenton en alian direkton.

En tiu bela verko la legantoj de 'Esperanto' rekonu la fonton de multaj rimarkindaj artikoloj. Kelkaj ĉapitroj jam estas surpasitaj de la okazintaĵoj; la ĉefa parto, kiun ni rajtas konsideri kiel la spiritan testamenton de Hodler, meritis esti bele presata en la lingvo paciga, de li amegata.

Pli ol antaŭe Hodler sin okupis dum tiuj jaroj pri lingvaj demandoj — okupo, pro kiu oni preskaŭ faris al li riproĉon. Ne sole li uzis sian bonan esperantistan rajton, ne sole li simple daŭrigis tradicion el la unuaj jaroj de sia gazeto, li ankaŭ estis pli sperta ol multaj kritikantoj. Profunde li konis la lingvon, dek jarojn li staris meze en la movado, kaj el sia loĝloko li povis pli facile kontroli la konkurencon. Malagrabla estis konstati, kiajn dikajn vortarojn kreus aliaj, dum ĉe ni oni ankoraŭ disputas pri la malbona organizo de la Lingva Komitato, nenion laborinta dum la militepoko. La dumviva celo de Hodler estis kunigi la lingvon kaj ĝian uzadon, unu adaptante al la alia. (...) Tiel obstineco de unu flanko ankaŭ malmoligis lian kapon. Multo tro inteligenta por kredi sin senerara, li certe estus kun la tempo aliformiginta proponojn ne plaĉintajn, kiel li forigis netaŭgajn administrajn metodojn. (...)

La ekstera vivo de Hodler rakontiĝas en kelkaj linioj. Loĝante en meblita ĉambro post la morto de sia patrino, li estis atakata la unuan fojon de pulmmalsano, tiel ke ni timis por lia vivo. Li iom resaniĝis, kvankam de tiam agiĝis nur pri pli aŭ malpli da malforteco, ĉar restis en li la ĝermo de la morto. Longan tempon li okupis ĉambreton en nia oficejo: fera lito, kelkaj tabloj kaj seĝoj krakemaj, areto da libroj, malmultaj personaj memoraĵoj. Jen ĉio. Li vivis el modesta rento de sia patro, kiu malŝatis, ke la filo malŝparas siajn talentojn je „fantazia afero“ sen certa estonto kaj ekzistebleco. Por lin kontentigi Hector iomete pentris kun sufiĉa lerteco; sed kiel vera filo de obstina patro, li fosis sian propran sulkon, kien lin kondukis inklino kaj la sento de l'devo, oferante la personan estonton al tiu de l'esperantismo. Liaj malsanoj, kiel la respekto, kiun lia nelacigebla laboro devis influi al la patro, plibonigis la reciprokajn rilatojn, sekve la vivtenadon de la filo. Post longa fianĉiĝo li edziĝis 1918, baldaŭ poste luprenante loĝejon en la monta kuraĉloko Leysin. Ne malmulte mi ĝojis konstatinte, kiel la antaŭa duoncigano estis transformiĝinta je atentema edzo en tre komforta ĉirkaŭaĵo. Malgraŭ ke li estis preskaŭ perdinta la voĉon kaj pasis siajn tagojn skribante sur kuŝseĝo, mi sentis lin feliĉa. Transdoninte la oficejajn priokupojn al aliaj manoj, esperante, ke la spertoj el la milito malfermos la okulojn al la homoj, li intencis ankoraŭ multe labori por la interpopola alproksimiĝo. Varman dankon al lia edzino, kiu per sindono malofta kaj zorga flegado tiom plibeligis la lastajn jarojn de nia amiko.

Esepte lia kvazaŭ profesia vizito de ĉiuj esperantistaj kongresoj kaj malmultaj vojaĝoj al Italio kaj Francio, Hodler ne vidis fremdajn landojn. Kiom bone li konis ilian mentalecon, tion scias liaj legantoj. Fartinte laŭŝajne pli bone dum Februaro de tiu jaro, li preparis ĉion por translokiĝi proksime de Lausanne, kiam li devis foriri por ĉiam.

Sian laboremon kaj ekkolereman temperamenton Hodler havis de la patro, supozeble ankaŭ el la patra gento herediĝis la terura tuberkulozo, tiom disvastigita en nia lando. De la patrino devenis la natura delikateco, kvazaŭ neinstruita bonedukiteco, kiu kontrastis kun lia pli ol simpla, okaze nezorgita eksteraĵo. Dum sia malfeliĉa juneco li lernis suferi, observi, silentante. En la 11 volumoj de nia korespondado, troviĝas simplaj aludoj je operacioj kaj senkulpiĝoj, kial li ne povis labori, sed neniu plendo, neniu riproĉo. Nur

unufoje, rakontis al mi lia edzino, kiam subite li fariĝis riĉa, li malgaje enkovertigis la hereditajn valorpapirojn, dirante: „Tiu tuta mono ne reaĉetos unu el miaj ruinigitaj pulmoj.“ Oni ne rajtus diri, ke li estis melankolia; li vivis en tiu gaja seriozeco, observebla ĉe forte laborantaj personoj, rilatante kun la mondo pli per siaj ideoj ol per sia persono. Ofte li faris bonegajn spritaĵojn; okaze li kore ridis, neniam mi vidis lin legi kun plezuro amuzajn ĵurnalojn. Mankis al li la facilanima spirito. Prenu ordinaran komercvojaĝiston, belvestitan, grasan, kiu ridigas tutan societeton, aŭ ĉe botelo da vino klarigas, kiel Dio estus devinta krei la mondon, kiu ĉion povas, scias kaj ĉion vidis, — poste returnu tiun personon en sian malon de komenco al fino, kaj vi havos Hodler. Liaj kapabloj estis ĉefe tiuj de eminenta ĵurnalisto: rapida kompreno de gvidantaj ideoj, facileco je klara aranĝo kaj skriba esprimo, enviinda kapablo ĉiam esti ĝustatempa. Ne sklavo aŭ eĉ nur servisto de bonordo, li vivis kun la kalendaro en la kapo. Zorge pripensitaj artikoloj alternis laŭ la cirkonstancoj kun aliaj, rapide ĵetitaj sur la papero, sed je fiksa dato Hodler estis nepre preta.

Kun la respekto, kiun influis lia supera inteligento kaj laboremo, estas lia reguleco, kiu starigis lian altan aŭtoritaton en la oficejo. Tro timema por estri, — la agrablan taskon maldungi oficistojn aŭ forpeli altrudemajn vizitantojn li prefere donis al mi, — sen intereso por la mastrumaj bezonoj de la ĉiutaga vivo, li estis la mastro de ĉio, per la forto de sia karaktero. Pripensema, li turnis kaj returnis la aron de siaj ideoj por trovi la ĝustan solvon. Estas el miaj plej agrablaj memoroj tiuj multhoraj noktaj promenadoj, dekfoje unu straton dekfoje alian, kiam ni priparolis la novajn statutojn, la hotelan servon, aŭ aliajn planojn esperantistajn, aŭ konstruis pro amuziĝo fantaziaĵojn. Same belaj estis liaj koleroj. Iam li venis malkontentege el esperanta kurso, kies gvidadon li estis bonkore akceptinta, ne konante sin mem. „Stettler, estas nura bando de malsprituloj, daŭrigu ĝin, mi ne plu iros.“ Rapide pensante li ne povis toleri, se iu ne povis sekvi, same lin ekscitis la malhelpetoj de l'vivo, ĉe despli oftaj ke li ne estis modelo de praktikeco. Miaj proponoj ne ĉiam plaĉis: precipe pri presaĵoj, formuloj aŭ aliaj detaloj, gravaj por la funkciado de UEA, okazis akraj disputoj inter ni, kvankam neniam personaj. Baldaŭ, Esperanto vere ne taŭgas al tio. ĉiu refalas en sian hejman lingvon, unu pli kriante ol la alia, ĝis post unu, du minutoj ni ekridas. Unu cedas, aŭ ĵetita monero decidas. Sed iun tagon, kiam plej malkontente mi ensaltis lian pordon: „Hodler, kiu malspritulo fabrikis tiun sensencaĵon“, li rigardis min en la okulojn, trankvile respondante: „Oh, mallaŭdu kiom vi volas, hodiaŭ mi ne emas koleri!“

En Hodler ĉio koncentriĝis en lia laboro, utili, for de la homoj, al la homaro. Neniam lerninte la agrablan arton de ‘konversacio’, li restis eble plej malproksime de ĉio, kio nomiĝas salono, invito aŭ festo. Multaj vizitantoj de l'oficejo tial ne havis de li la veran impreson, kelkaj nur tiun, ke la Direktoro forestas. Intertempe Hodler estis forkurinta en sian ĉambron aŭ en kafejon, tie ellaborante artikolon, kiun, revenante, li gaje eltiris el unu el la sennombraj poŝoj de sia surtuto, ĉiam ŝarĝata je papero kiel rondiranta librejo. Aliaj, dum ili parolis pri la bela vetero, sentis, ke liaj ideoj estis tute alilokaj, aŭ rimarkis kun malkontento la foreston de formoj aŭ titoloj, je kiuj ili kredis sin rajtigitaj. Kiu lin konis aŭ sciis trafi en la celon de la pensoj lin okupintaj, tiu forlasis la ĉambron, riĉigita per novaj ideoj. Iom simile estis kun Hodler kiel paroladisto: ne mankis al li facila esprimkapablo, sed pro la multeco de ideoj aŭ la komplikeco de la formo lia parolado similis al artikolo, sekve ne kaptis sufiĉe rapide — aŭ li ekscitiĝis, tiel pli malkontentigante ol konvinkante la kontraŭulojn. Tial li kaj Bolingbroke-Mudie, tiu naskita prezidanto, bonege kompletigis unu la alian.

En urbo tiel asociema kiel Ĝenevo, Hodler aniĝis unu solan lokan societeton, tiun por la protekto de la bestoj, kaj iam diris, ke li ŝatus fari el UEA asocion por protekti la homojn. Malfeliĉe oni ne povis lin

decidigi, ke li partoprenu iun sporton, ludon, aŭ forlasu siajn okupojn, la longan tempon necesan por serioza kuracado. Kelkajn koncertojn li vizitis, malofte la teatron.

Intence mi montris la monton da malfacilaĵoj, super kiun lin kondukis la sorto, por ke ni esperantistoj rekonu la dankegon al li ŝulditan. Malgraŭ ĉio, lia vivo estis feliĉa. El la rilatoj kun malmultaj intimaj amikoj, el la simpatioj de miloj de samideanoj, kiuj aliĝis al UEA, Hodler ĉiam ĉerpis novajn fortojn. Por ke sukcesu la movado, li modeste laboris kvazaŭ oficisto, ne malŝatante okupojn malindajn je liaj kapabloj. Paŝo post paŝo irinte antaŭen li kreis fortan organizaĵon kaj per sia agado ekzemplon de heroa vivo, kiuj ne malaperos. Staru je la fino de tiu modesta memoraĵo la belaj vortoj, per kiuj li finis sian verkon:

„La ideoj nek estas netuŝeblaj, nek eternaj. Ofte ili estis ŝanĝataj dum la estinto, ili povos ankaŭ ŝanĝi estonte. La sorto, kiu nin enkatenigas kaj el kiu ŝajnas maleble liberiĝi, povas esti aliformigita per volo potenca. La batalo de la volo kontraŭ blindaj povoj estas la esenco de l’historio. Por fortaj animoj, la sorto ne estas tribunalo sen apelacio. Tial ni vekigu! Ni unuigu! Kaj ĉefe: ni laboru! laboru!“

Antologio XX

Edmond Privat

Universitata docento, instruisto, verkisto

Le choc des patriotismes (1931)

Les sentiments collectifs et la morale entre nations

Interpopola konduto (1935)

Enkonduko:

Edmond Privat (1889-1962), kiu estis grava svisa e-isto kun internacia signifo, mem estis rekta atestanto de la ekesto kaj de la laboroj de Ligo de Nacioj, kiu estis fondita por aboli la militon. Ĉi tiu mondorganizaĵo ja estis komplete nova sperto por la homaro, sed Privat kritikis ĝin, ĉar laŭ li en ĝi blovis ne nur tro da naciismo, sed al ĝi mankis ankaŭ iu specifa spirito – li nomis ĝin mistiko –, kiu vere naskus federalisman senton ĉe la popoloj. Kondiĉo por atingi ĝin estus ankaŭ la efektivigo de la neŭtralismo. Kaj ĉar en Ligo de Nacioj la ĉefaj lingvoj estis la angla kaj la franca, ekestus ne nur rivaleco inter tiuj du nacioj, sed multaj malgrandaj nacioj povus kredi, ke temas pri afero de francoj, angloj kaj usonanoj. Por akceli la internacian kunlaboradon inter la popoloj Privat estis konvinkita, ke utilis enkonduki neŭtralan universalan lingvon kiel Eo, kiu estis kreita de vera fakulo pri intergentaj problemoj, nome L.L. Zamenhof, sur la bazo de humanisma etiko kaj laŭ la principoj de la universaleco kaj neŭtraleco. Privat bedaŭris, ke la intelektuloj kutime ignoras Eon, kiu povus disvastigi la necesajn sentojn (aŭ moralon) pri vera internaciismo, mankantaj al Ligo de Nacioj. Provoj adopti Eon por enkonduki ĝin en la lernejojn aŭ apliki ĝin sur internacia nivelo ja estis faritaj, sed ne pripensitaj kaj faritaj ĝis la fino, kaj bedaŭrinde bojkotitaj de Gonzague de Reynold en 1923.

Multaj eldiroj en *Interpopola Konduto* en sia principo kaj en multaj kazoj validas ĝis hodiaŭ. Por bridi la blindan nacian pasion, Privat postulis en sia libro la konsideron de „interŝtata moralo“ kaj la starigon de „kuna tegmento super la naciaj plafonoj“, dum la ‘animon’, kiun kreis al si ĉiu popolo, „necesus altigi al la sento pri supera kuneco.“ Alie ĝi estus animo „ne komplete kaj netaŭga por vivo en socio“. Privat konstatis, ke „la rilatoj inter la ŝtatoj estas ankoraŭ multe malpli progresintaj ol la rilatoj inter la homoj“ kaj observis, ke la „diplomata ĝentileco inter ambasadoraj sinjoroj staras multe pli alte ol la bonvolo inter iliaj nacioj“. Finfine Privat venis al jena konkludo: „Por kunvivi pace, necesas tute alia honorsento. Lojale plenumi promeson, digne malŝati venĝon, esti la unua, kiu rezignas regi la ceterajn aŭ ilin timigi perforte, jen honoro pli taŭga kaj inda je kulturacio.“

Eĉ se ĝi eble ne liveris la plej konsekvencan solvopropozonon de la evitado de la militoj mem, *Interpopola Konduto* estis kuraĝa libro – tion devis konfesi ankaŭ la recenzanto en la ĝeneva gazeto *Nouvel Essor*, en kiu en 1932 aperis lia kritiko de la franca libroeldono. Por konstrui pli bonan, pli pacan mondon, Privat sugestis la principojn de la universala federacio, de la internaciismo kaj neŭtraleco, de la tolerado kaj kontraŭhegemoniismo. Pro tio li apartenis al la avangardaj progresemuloj de sia epoko. Kaj tial ne estas mirinde, ke la libro malplaĉis ekzemple al la naciistoj, kiuj ordonis en 1941 detruigi la librostokojn en la pariza eldonejo, kie aperis *Interpopola Konduto*. La eldonejo poste ne reeldonis ĝin. Grandparte dank’ al la e-istoj, kiuj tenas la memoron de Edmond Privat en honoro, la teksto restis neforgesita.

En sia *Le Choc des patriotismes* (1931), kiu aperis ĉe Filozofia Kolekto Felix Alcan en Parizo, respektive en ĝia Eo-versio *Interpopola Konduto* (1935), aperinta ĉe Literatura Mondo en Budapeŝto, Privat traktis la genezon de la malamo, perforto kaj milito inter la gentoj kaj la terurajn sekvojn de la naciismo. La ĉapitro pri novaj mistikoj, kiu estas ĉi-sekve reaperigita, apartenas, kune kun la raportoj de Ernest Naville kaj Pierre Bovet, al la plej belaj verkoj plede por Eo, kiuj entute ekzistas. (→ Interpopola konduto)

Originala teksto (en la lingvoj franca kaj Esperanto):

<p>Chapitre Mystiques nouvelles</p> <p>Ce qui manque à la Société des Nations, c'est une mystique. Pour devenir une patrie commune, à l'image des Etats-Unis, il lui faudrait un patriotisme à elle, une foi, <i>une langue</i>, une religion pour appuyer sa morale. Elle n'a qu'un pacte. C'est trop sec.</p> <p>Chaque patrie à son amour national pour la soutenir. La S. D. N. est trop jeune pour être aimée d'amour. Ses dirigeants eux-mêmes lui préfèrent leur patrie locale. La Confédération des républiques Suisses a connu ce phénomène pendant très longtemps. C'est la défense commune, l'armée et les tirs fédéraux qui devinrent un des liens les plus forts. C'est pourquoi ses intellectuels y tiennent tant. Ils n'ont pas encore trouvé mieux pour unir le pays.</p> <p>La Société des Nations ne peut guère se bâtir une religion militaire, puisqu'elle est fondée pour abolir la guerre. Elle ne peut adopter d'avance le drapeau rouge et la religion</p>	<p>Ĉapitro Novaj mistikoj</p> <p>Al Ligo de Nacioj mankas ia mistiko. Por ke ĝi fariĝu komuna patrujo laŭ la usona bildo de Unuigitaj Ŝtatoj, necesus ia propra patriotismo, ia kredo, ia lingvo, ia religio aŭ adoro por subteni ĝian moralon.</p> <p>Nur statuton ĝi posedas. Tro seka ĝi estas.</p> <p>Ĉiu regno havas patrujamon por sin helpi. Tro juna estas la Ligo por esti amata aŭ adorata. Ankaŭ tro malegaleca. Ties gvidantoj mem pliamas sian hejman patrujon. Dumlonge la svisa respublikaro spertis la samon. Iom post iom komuna sindefendo, kunbatalo, armeo kaj tutlandaj pafkonkursoj fariĝis la plej forta ligilo. Pro tio multaj intelektuloj tiom ŝatis armeon. Ke ekzistas alia ligilo multe pli solida, tion ili nur poste komprenis.</p> <p>Militan religion la Ligo ne povis krei al si, ĉar ja por forigi militon ĝi estis fondita.</p> <p>El kolektiva bezono je paco ĝi vivas. El popolaj sopiroj al konkordo ĝi sin nutras. Aranĝitan</p>
--	--

<p>socialiste. La plupart de ses membres ont des gouvernements capitalistes. De là cette méfiance ouvrière, très naturelle.</p> <p>Elle vit pourtant d'un besoin collectif. Elle se nourrit des aspirations populaires à la paix et à la concorde. Elle a tenté de faire enseigner dans les écoles un catéchisme approprié. Mais le statut de la Cour et le Covenant de Wilson laissent froide l'enfance et sceptique la jeunesse, à moins d'être animés par un maître enthousiaste.</p> <p>Un texte, une armature diplomatique ou judiciaire, des secrétariats bureaucratiques, c'est un pain de réflexion, mais pas une manne du cœur. Les patries nationales sont avantagées. Elles ont leur drapeau, leur langue ou leurs traditions, leur poésie et leur musique, leurs souvenirs dramatiques, leur histoire en couleurs brillantes, un sentiment, des émotions. Tout cela manque à la S. D. N. Son expérience est neuve, sa charte abstraite, sa littérature officielle réduite à deux langues. On sent dominer les deux grandes puissances qui remplissent les bureaux de leurs nationaux et de leurs jalousies.</p> <p>Aux assemblées, les délégués d'autres pays doivent lire péniblement un manuscrit en anglais ou en français, tandis qu'un orateur de Londres ou de Paris peut les foudroyer d'éloquence en sa langue maternelle. Un diplomate est parfois linguiste. Un tribun rarement. Tel qui galvanise la foule à Rome ou à Tokio n'est plus à Genève qu'un petit homme gêné, à la merci du traducteur. Qu'on se représente un Briand à Nankin pour apprécier l'injustice et l'inégalité.</p> <p>C'est plus grave encore dans l'opinion publique en tous pays. Le sentiment de la patrie commune, à côté de l'autre, est privé de tout organe. Il n'a point d'eau pour vivre et se</p>	<p>katekismon pri siaj celoj ĝi klopodis instrui en la lernejoj. Sed la Statuto de la Haga Tribunalo aŭ la Liga Kontrakto de Wilson nek kortuŝas geknabojn, nek entuziasmigas junularon, se ne vivigas ilin escepte fervora instruisto.</p> <p>Jura dokumento, diplomata organizo, burokrataj oficejoj, jen pano por pripenso, sed ne lakto por la koro. Kompare, la naciaj patrujoj sidas pli avantaĝe. Ili havas propran flagon, lingvon aŭ tradicion, poezion kaj muzikon, glorajn memoraĵojn, brilkoloran historion, unuvorte senton, emocion.</p> <p>Ĉio simila mankas al la Ligo. Nova estas ĝia sperto, abstrakta ĝia leĝo kaj seka ĝia dulingva literaturo. De la komenco, du grandpotencoj plenigis la oficejojn per siaj regnantoj kaj trudis siajn du lingvojn kiel sole oficialajn.</p> <p>Ĉe la kunvenoj, la ceterlingvaj delegitoj estas devigataj peni por legi angle aŭ france manuskripton antaŭskribitan, dum oratoro el Parizo aŭ Londono rajtas ilin fulmotondri per elokventa parolado en sia nacilingvo. Ofte la diplomatoj estas multlingvuloj. Malofte la gvidantoj mem de la popoloj. Kiu hejme kapablas entuziasmigi amasojn, tiu sama en Ĝenevo fariĝas vireto ĝenata, komplete dependa de tradukistoj.</p> <p>Nur imagu iun Briand en Nanking aŭ Tokjo por ekkompreni la maljustaĵon per supozita renverso.</p> <p>Eĉ pli grave suferas la publika opinio en ĉiuj landoj. Al la bezonata sento pri <i>komuna patrujo krom la nacia</i> entute mankas organo. Por vivi aŭ kreski ĝi ne havas eĉ akvon. Ĉio, kion faris centra lingvo por unuigi vastan landon kiel Francujon aŭ Usonon, tie malestas. Iam la lingvo latina kunigis la kristanan mondon. El la uzo moderna ĝi plene forfalis sen ia espero al praktika reviviĝo.</p> <p>La mondon Islaman servas araba lingvo, komuna ligilo kaj esprimilo. Vivanta kaj kapabla ĝin konservis senhalta uzado.</p>
--	---

<p>développer. Tout ce qu'une langue centrale a fait pour unir un grand pays comme la France ou l'Amérique, il n'en a pas le moyen. Le latin groupait jadis la chrétienté. Il est tombé sans espoir de résurrection moderne. L'arabe sert à l'Islam de truchement international. L'usage l'a maintenu vivant et capable.</p>	<p>Ekzistas ja sperto tutmonda pri helplingvo kaj federala sento sur malgranda skalo: la esperantista eksperimento. Multaj kleruloj ĝin ignoras. Ili nescias, ke ĉiudutage aperas nova libro en Esperanto kaj ĉiumonate kvanto da gazetoj en tiu lingvo. Neniām ili aŭdis, ke ĝin parolas kiel solan kongreslingvon grandaj internaciaj kunvenoj kaj aplaŭdas elokventajn oratorojn el diversaj landoj.</p>
<p>Il y a bien une expérience de langue auxiliaire et de sentiment fédéral. C'est l'Espéranto. Beaucoup d'intellectuels l'ignorent. Ils ne savent pas qu'il paraît tous les deux jours un nouveau livre et tous les mois des nuées de gazettes en cette langue, ni qu'elle sert d'idiome unique a des Congrès et des conférences, où la foule applaudit d'éloquents orateurs de pays divers. Le délégué turc y compte autant que l'Américain, le Chinois que le Français. Nul n'a peur de faire des fautes en parlant la langue étrangère du puissant voisin. Plus sûr de lui-même et plus égal aux autres, chacun s'exprime avec plus de force et de liberté. Il y a des réunions d'intellectuels, de commerçants, d'ouvriers, de catholiques et d'idéalistes, tous avec leurs organisations particulières. Mais la langue est commune. Après l'anglais, le français, l'allemand, c'est la seule langue qui serve à des conférenciers pour organiser leurs tournées et atteindre partout sans traduction des auditoires nationaux dans les villes de cinq continents.</p>	<p>Tie la hungara delegito gravas kiom la usona, la ĉina kiom la franca. Neniu timas tie fari erarojn uzante fremdan nacilingvon de potenca najbaro. Pli certa pri si mem kaj pli egala kun aliaj, ĉiu sin esprimas pli trafe kaj libere.</p> <p>Okazis kunvenoj de kleruloj, komercistoj, laboristoj, edukistoj, katolikoj, ĉiuj kun aparta ligo internacia. Sed komuna estas la helplingvo. Krom angla, franca kaj germana, Esperanto estas nuntempe la sola lingvo uzata de prelegistoj por organizi rondvojaĝojn kaj rekte alparoli ĉie sen traduko naciajn aŭdantarojn en urboj kaj urbetoj de kvin kontinentoj.</p>
<p>La Société des Nations a fait une enquête sur l'Espéranto. Sa deuxième Assemblée l'avait décidé. Elle a trouvé quinze Etats qui l'enseignent dans un certain nombre d'écoles, et un total de huit cent mille adultes ayant suivi des cours publics. Le secrétaire général ouvrit dans ses locaux une conférence d'éducateurs sur les résultats de cet enseignement. Il y avait seize Etats représentés.</p>	<p>Pri Esperanto enketis eĉ Ligo de Nacioj. Tion decidis ĝia dua ĝenerala kunveno. Ĝi trovis dekkvin ŝtatojn instruantaj la lingvon en diversaj lernejoj kaj kalkulis okcent mil plenaĝulojn sekvintajn publikajn kursojn. Sir Eric Drummond malfermis en la Sekretaria Palaco Konferencon de edukistoj pri la rezultatoj atingitaj per tia instruado. Deksep ŝtatoj partoprenis.</p> <p>La raportintoj insistis pri la morala efiko al la geknaboj. Esperanto estas neŭtrala. Ĝin ilustras verda flago, el espara koloro, apud la nacia flago. Ĝi posedas ankaŭ himnon pri la nova sento kaj espero je konkordo. Stariĝas infanoj por ĝin kanti post la nacia himno.</p>
<p>On insista sur l'effet moral produit chez les</p>	<p>Kun lernantoj alilandaj ili korespondas. Geografion ili lernas. Bildojn kaj specimenojn ili interŝanĝas. Grupe ili vojaĝas. Ilin eksterlando ĝoje bonvenigas. Por ili la nova lingvo simbolas idealon de kunlaboro</p>

<p>enfants. L'Espéranto est neutre. Il a son drapeau vert, couleur d'espoir, qu'on place à côté du national. Il a son hymne à la paix, qu'on chante après celui de la patrie. Les écoliers correspondent avec ceux d'autres pays.</p>	<p>kaj egaleco inter la popoloj super la diversaj kredoj politikaj aŭ kulturaj. Ekzistas jam vasta literaturo kreskanta ĉiutage pri laboroj de scienco, paco kaj belarto.</p>
<p>Ils apprennent la géographie. Ils échangent des vues et des objets. Ils voyagent en groupe. Ils sont fêtés. La langue nouvelle symbolise à leurs yeux l'idéal d'égalité fraternelle entre les peuples, au-dessus des conceptions politiques ou religieuses diverses. Il existe une littérature qui se développe et célèbre les héros de la science et de la paix.</p>	<p>Tion konstatis la Ligo raporto kaj ĝin akceptis per voĉdono la tria ĝenerala kunveno.</p>
<p>Le rapport était positif et fut adopté par la III^e Assemblée (21 sept. 1922).</p>	<p>Sed nenion pri lernejoj oni decidis. Pri gravaj aŭ malgravaj aferoj de ĝenerala utilo, pri senarmigo, pri doganoj, pri trafiko, pri helplingvo, pri ĉio ajn la Ligo, jam de la komenco, voĉdonis nur pri raportoj, malofte pri decidoj.</p>
<p>Mais aucune décision ne fut prise en ce qui concerne les écoles. Lord Cecil encouragea les espérantistes à développer leur expérience. Dans les commissions M. Léon Bérard fit combattre l'Espéranto, qu'il avait interdit dans les écoles françaises. Quand son décret fut annulé, la V^e Assemblée de la S. D. N. recommanda que l'Espéranto soit admis partout pour les télégrammes «en clair» à titre de langue auxiliaire des communications internationales. En 1925 les Etats de l'Union télégraphique universelle, en conférence à Paris, décidèrent cette admission officielle.</p>	<p>Lord Cecil kuraĝigis la esperantistojn plivastigi la eksperimenton. En la Komisiono por intelekta kunlaboro, la ministro Léon Bérard kontraŭbataligis Esperanton, kiun li malpermesis en la francaj lernejoj malgraŭ favora petskribo de dudekkvin scienculoj, membroj de l' Akademio.</p>
<p>Ce qui est intéressant dans l'expérience espérantiste, au bout de quarante ans, c'est le sentiment religieux qu'il a développé sur le terrain de la morale et de la tolérance entre peuples. Il y a là tout un réseau d'émotions collectives, finement analysé par un psychologue anglais [Prof. Fluegel, Université de Londres : La psychanalyse du mouvement espérantiste. Londres 1924].</p>	<p>Post kiam nuligis lian dekreton nova franca registaro, la Kvina Kunveno de la Ligo rekomendis, ke ĉiuj ŝtatoj akceptu, samtarife kiel nacilingve kaj latine, la telegramojn en Esperanto, konsiderata kiel „praktika helplingvo de internacia komunikado“.</p>
<p>C'est parce qu'il a vécu d'un sentiment qui lui</p>	<p>En 1925 la regnoj de l' Interŝtata Telegrafa Unio, ĉe Pariza Konferenco, decidis tion per ŝanĝo en la statuto.</p> <p>Kio interese elstaras el la duoncentjara sperto pri Esperanto, tio estas la nova mistiko aŭ ara sento, kiun ĝi disvastigis sur la kampo de interpopola toleremo kaj etiko.</p> <p>Tiun apartan fadenaron de kolektivaj emocioj delikate analizis angla psikologo. [Prof. Fluegel, Universitato de Londono 1924].</p> <p>Ĝuste ĉar ĝi vivas el sento propra, simile kiel nacilingvo, tial Esperanto riĉiĝis kaj fleksebliĝis tiom, ke ĝi sukcesis eĉ allogi novelistojn, oratorojn, eĉ poetojn, kiuj nun uzas ĝin por trafi rekte</p>

<p>est propre, comme une langue vivante, que l'Espéranto s'est enrichi et assoupli au point d'attirer des romanciers, des orateurs et des poètes, qui s'en servent pour s'adresser directement au public international. Un intellectuel ignorant s'imagine que la langue en est restée au petit vocabulaire de 1887 et ne sert qu'à l'hôtel ou à la gare. La vérité, c'est qu'elle sert encore très peu dans l'hôtellerie, mais beaucoup plus au théâtre, en Congrès, en cours de vacances, et en diffusion générale de la culture et des sentiments d'humanité. La plus grande partie de la littérature espérantiste fait connaître aux autres pays l'âme des plus lointains ou des plus petits, dont les langues nationales sont peu répandues au dehors. La base grammaticale est restée simple et régulière, mais les besoins impérieux d'expression nuancée ont développé le style et la dérivation comme dans n'importe quelle autre langue obligée de satisfaire l'usage naturel.</p> <p>On voit cette expérience avant tout comme une proposition pratique pour faciliter les communications. En fait elle est plus originale comme élément d'un patriotisme humain qui est respectueux du sentiment national et qui n'est pas né d'un antagonisme.</p> <p>C'est le fameux „neutralisme“ que raillent les révolutionnaires.</p> <p>Il contient toute la mystique sans haine, dont la S. D. N. aurait besoin pour gagner le cœur des foules par l'école et l'enthousiasme. Ceux qui préfèrent une Société des Nations anémique et lointaine ont avantage à refouler l'Espéranto vers les autres Internationales où il n'est plus qu'un moyen commode. Elles ont déjà leur mystique de classe ou d'Église.</p> <p>„La puissance du langage est une grande force, dit le rapport officiel, et la S. D. N. a de</p>	<p>ĉiulandan publikon, se ne vastegan, almenaŭ tutmondan. Verko tuj legata en kvindek landoj kaj rimarkata de kelkaj ĵurnalistoj en ĉiu regno ricevas kalkulindan atentigon.</p> <p>Ne informita klerulo imagas, ke tia lingvo restis senviva kun la sama vortareto kiel en 1887 kaj utilas nur en hoteloj aŭ stacidomoj. Fakte ĝi malmulte uziĝas en hoteloj, sed multe pli por kongresoj, teatro, somerkursoj, paroladoj kaj ĝenerala disvastigo de kulturo kaj homaraj sentoj.</p> <p>La plej granda parto de esperanta literaturo konigas al ceteraj popoloj la animon de la plej malproksimaj aŭ malgrandaj nacioj, kies lingvoj estas nelernataj ekstere.</p> <p>La gramatika bazo restis simpla kaj regula, sed la postuloj de kolora esprimado kreskigis ja stilon kaj derivadon same kiel en ĉia ajn lingvo devigata kontentigi la bezonojn de natura uzado.</p> <p>Tiun eksperimenton oni ĉefe rigardas kiel praktikan proponon por faciligi komunikadon. Fakte ĝi estas multe pli originala kaj rimarkinda kiel elemento de tuthomara patrujamo, kiu respektas la nacian senton kaj ne naskiĝis el antagonismo. Tio estas la neŭtralismo, ofte mokata de revoluciuloj.</p> <p>Ĝi entenas ĝuste tiun amikeman mistikon — senkoleran kaj senmalaman — kiu mankis al la Ligo de Nacioj por varbi la koron de l'amasoj per lernejo kaj fervoro. Kiuj preferas konservi anemian aŭ senvivan Ligon, tiuj kompreneble havas intereson forpuŝi Esperanton al aliaj Internacioj, kie ĝi povas nur ludi la rolon de ilo oportuna, ĉar ili jam posedas sian propran mistikon, ĉu klasan, ĉu eklezian.</p> <p>„La perlingva potenco estas granda forto, konstatis la oficiala raporto, kaj la Ligo de Nacioj havas seriozajn motivojn por sekvi kun aparta intereso la progresadon de la esperantista movado, kiu povus iam grandrezulte efiki al la morala unueco de</p>
---	--

<p>bonnes raisons de suivre avec un intérêt tout particulier la marche du mouvement espérantiste, qui pourrait avoir un jour de grandes conséquences au point de vue de l'unité morale du monde si sa diffusion se généralisait.“</p>	<p>l'mondo, se ĝia disvastigo fariĝus ĝenerala.“ Alia ebleco estas la tutmonda oficialigo de la angla kiel helpa mondlingvo. Tion kontraŭstaras Francujo kaj ankaŭ iom malfide timas aliaj nacioj, kiuj pliŝatus neŭtralan mistikon ol influon de unu grandpotenco, kompreneble vastigotan per ties lingvo.</p>
<p>L'alternative, c'est l'adoption universelle de l'anglais comme langue auxiliaire. Cette adoption est combattue par la France et regardée avec une certaine méfiance par d'autres nations, qui préfèrent une mystique neutre à celle d'une grande puissance fatalement répandue par sa langue.</p>	<p>En Azio la hinda nacia movado ja uzis la anglan lingvon por sin organizi, sed nun ĝi emas ĉie lernigi hindi, por ĝin anstataŭi kiel helplingvon de la nova Federacio. Tie la sento reaperas kaj sopiras al pli taŭga organo, eĉ se malgajnos la utilo internacia.</p>
<p>En Asie le nationalisme hindou s'est bien servi de l'anglais pour s'organiser, mais il pousse à l'emploi de <i>l'hindi</i> pour le remplacer comme langue auxiliaire de la nouvelle fédération. C'est le sentiment qui reprend ses droits et qui cherche son meilleur organe.</p>	<p>Ne la teoria ideo pri internacia lingvo kapablas interesi nin. Pri ĝi same kiel pri paco kaj senarmigo, ni aŭdis preparoli jam de generacioj. Centoj da aliaj vortsistemoj estis konstruitaj kaj ne sukcesis. Postvivis Esperanto pro sia sentoforto. Kio gravas, tio estas la sperto kaj la fakto pri tiu lingvo sur la kultura kampo.</p>
<p>Ce n'est pas l'idée théorique d'une langue auxiliaire qui peut nous intéresser. On en parle, comme de la paix, depuis des générations. Des centaines d'autres systèmes ont été construits et n'ont pas réussi. Ce qui compte, c'est l'expérience et le fait moral de l'Espéranto, lancé par un humaniste oriental.</p>	<p>Naskita en tiu Polo-Litovujo, kie miksitaj gentoj kaj religioj interfrapas siajn antaŭjuĝojn kaj malamojn, Zamenhof proponis al la popoloj homaran etikon, bazitan sur la respekto al la ceteraj. Li petis ilin allasi, eĉ simpatie, la kredon kaj lingvon de la ceteraj gentoj kiel egalajn laŭ rajto.</p>
<p>Né dans cette Lituanie polonaise où les races et les religions mêlées entrechoquent leurs préjugés et leurs haines, Zamenhof proposait aux peuples une éthique humaine, basée sur le respect d'autrui. Il leur demandait d'admettre avec sympathie la langue et la foi des autres groupes nationaux comme égales en droit. Il préconisait même, pour les pays mixtes, des noms neutres comme Belgique, Etats-Unis, Suisse, République Sérénissime (ancienne Pologne). On trouve une idée pareille chez Napoléon (Illyrie pour le pays des Serbes, Croates et Slovènes).</p>	<p>Por mikraj landoj li eĉ rekomendis neŭtralajn nomojn, kiel <i>Belgujo</i>, <i>Usono</i>, <i>Svislando</i>, <i>Serenisima Respubliko</i> (antaŭa Polo-Litovujo). Similan ideon jam ŝatis Napoleono, kiam li akceptis la nomon <i>Ilirio</i> por la regno de la serboj, kroatoj kaj slovenoj. Se la germanlingvaj alemanoj, kiuj fondis la svisan Konfederacion, estus nomintaj ĝin <i>Alemania</i>, tiam la franclingvaj kaj italaj romanoj ne havus en ĝi sian lokon egalan kaj liberan. Nur unu kvaronon ili reprezentas laŭ nombro, sed multe pli laŭ influo, ĉar ili sidas egale kaj la plimulto ne forigas, sed subtenas ilian apartan kulturon. Ano de la malplimulto rajtas tion konfesi.</p>

<p>Si les Suisses alémaniques, fondateurs de la Confédération helvétique, l'avaient nommée Alémanie, les Romands n'y auraient pas leur place égale et libre. Ils ne sont qu'une minorité d'un quart. Zamenhof avait compris le secret du problème: point de nation privilégiée se croyant seule maîtresse et propriétaire de l'Etat. En échange, des minorités loyales, qui collaborent parce qu'elles sont associées.</p>	<p>Zamenhof klare vidis la solvon de la problemo. En miksa regno: neniu privilegia nacio, kredanta sin sola mastro kaj posedanto de la ŝtato. Interŝanĝe: lojalaj malplimultoĵ, kunlaboremaj, ĉar egalrajtaj.</p>
<p>Cette coopération des races, maintenant leur langue et leur âme, il la voyait possible pour le vaste monde avec un idiome auxiliaire et une éthique humaine, universelle et neutre. Il lança l'Espéranto pour la répandre. On oublia ses idées. Peu à peu la diffusion de la langue attira partout les esprits parents. Cette conception d'un monde fédéral et tolérant cherchait un organe pour s'exprimer. L'Espéranto servit de canal et ce courant lui donna la force et la vie. La philosophie morale de Zamenhof revint sous forme de sentiment. Nul ne lit ses anciennes brochures. On ne connaît que le grammairien. Mais son calcul était juste. Une langue répand un esprit. En même temps, elle attire à soi toute aspiration commune.</p>	<p>Tian kunlaboradon de popoloj, konservantaj propran lingvon kaj animon, li konsideris ebla por la tuta mondo per helpa lingvo kaj homara etiko, universala kaj neŭtrala.</p>
<p>L'expérience de l'Espéranto, c'est d'avoir développé l'expression de cette âme flottante qui cherchait un véhicule. La foi naissante à l'unité dans le divers, l'humanité qui prend conscience d'elle-même et reste attachée aux valeurs nationales, pleines de charme et de couleur, voilà ce qui a donné des ailes et du caractère à l'Espéranto. Sans une mystique à incarner, il ne serait jamais devenu tout seul une langue vivante, où l'orateur puisse empoigner un auditoire et lui arracher les larmes ou le sourire.</p>	<p>Esperanton li iniciatis por disvastigi tian etikon. Pri liaj ideoj oni forgesis. Tamen, iom post iom, la disvastigo de la lingvo allogis ĉie parencajn pensantojn. Sufiĉe tipa estas la kutimo de la esperantistoj nomi sin reciproke <i>samideanoj</i>, eĉ se ili nescias precize kial. Pli ĝuste ili estas ĝenerale samsentanoj.</p>
<p>Cette expérience attire la curiosité du linguiste qui prend la peine d'étudier les faits.</p>	<p>La sopiro al tolerema kaj federacia mondo ja bezonis esprimilon. Troviĝis Esperanto kaj utiliĝis kiel kanalo. Al la lingvo mem tiu fluo donis forton kaj vivon. La filozofia etiko de Zamenhof revenis en formo de popola sento. Liajn malnovajn broŝurojn pri <i>homaranismo</i> jam neniu legas. Nur la lingviston oni konas. Tamen ĝusta sin montris lia kalkulo. Lingvo disvastigas atmosferon. Samtempe ĝi logas al si ĉian sopiron komunan.</p>
<p>L'expérience de l'Espéranto, c'est d'avoir développé l'expression de cette âme flottante qui cherchait un véhicule. La foi naissante à l'unité dans le divers, l'humanité qui prend conscience d'elle-même et reste attachée aux valeurs nationales, pleines de charme et de couleur, voilà ce qui a donné des ailes et du caractère à l'Espéranto. Sans une mystique à incarner, il ne serait jamais devenu tout seul une langue vivante, où l'orateur puisse empoigner un auditoire et lui arracher les larmes ou le sourire.</p>	<p>La sperto pri Esperanto kuŝas en tio, ke ĝi ebligis disfloriĝon de tiu fluganta sento, kiu bezonis esprimilon. La naskiĝanta kredo je unueco en diverseco, la homaro ekkonscia pri si mem samtempe fidela al la naciaj valoroj, riĉaj je ĉarmo kaj koloro, jen tio, kio donis al Esperanto flugilojn kaj karakteron. Sen ia mistiko enkorpigota, neniam ĝi estus mem fariĝinta lingvo vivanta, kapabla servi al parolantoj por entuziasmigi aŭdantaron kaj rabi ties ploron aŭ rideton.</p>
<p>Cette expérience attire la curiosité du linguiste qui prend la peine d'étudier les faits.</p>	<p>Tiu sperto vekas la scivolemon de lingvosciencistoj penantaj ekzameni la faktojn, sed ĝi eĉ pli multe interesas psikologojn kaj etikistojn, kiuj esploris arajn mentalecojn. En la <i>interna ideo</i> de la esperantista mondo ili vidas kristaliĝon de tiu</p>

<p>Elle intéresse plus le psychologue et le moraliste, qui explorent les mentalités de groupe. Ils voient dans <i>l'interna ideo</i> du monde espérantiste neutre une cristallisation du sentiment religieux qui manque à la Société des Nations. L'Espéranto à l'école est un catéchisme actif et plus vivant que les formules diplomatiques ou juridiques.</p> <p>Ce n'est pas le même que la conscience de classe, infiniment plus puissante.</p> <p>L'internationalisme ouvrier est né de la lutte pour la justice. L'espérantisme est plutôt né d'amour et de curiosité pour la vie nationale des autres peuples, surtout les petits. Il incarne un plaisir de les connaître et de les trouver sympathiques, une joie de leur découvrir à son tour les valeurs de sa patrie, une satisfaction du goût qu'ils y prennent.</p> <p>De là une amitié réjouie et le sens de l'unité morale. Anglais, Français, Chinois, Polonais, et Danois sont après tout des hommes avec les mêmes soucis. Ensemble on souhaite vivre en famille paisible. L'habitude qui est développée par l'Espéranto, c'est l'égalité confiante et l'unité fédérale. Toutes les nationalités sur le même pied, nul n'imposant sa langue aux autres, mais chacun la gardant à l'intérieur de ses frontières.</p> <p>„Ce qui impressionne surtout, écrivait Inazo Nitobé, le sénateur japonais qui représenta la Société des Nations à plusieurs Congrès espérantistes, c'est le caractère d'unanimité et d'égalité que donne à une réunion semblable l'emploi d'une langue commune.“</p> <p>L'habitude prise est de celles qui façonnent une morale nouvelle des rapports internationaux. Mais ce qui est le plus fort, sur son champ limité, c'est le sentiment répandu. L'humanité vit d'émotions bien plus que de raisonnements.</p>	<p>religia sento, kiu mankas al la Ligo de Nacioj. En la lernejoj Esperanto montriĝis katekismo pli vivanta kaj pli efika ol diplomataj aŭ juraj formuloj.</p> <p>Tiu sento estas tute malsama ol la klaskonscio kompreneble multe pli potenca en la mondo. La laborista internaciismo devenis el batalo por socia egaleco. Malsimile esperantismo naskiĝis el simpatio kaj scivolemo pri la nacia vivo de la ceteraj popoloj, speciale la malgrandaj. Ĝi entenas la plezuron ilin koni kaj ilin trovi amindaj, ankaŭ la ĝojon konigi al ili la valorojn de la propra patrujo kaj plie ĝui siavice la fakton, ke tio plaĉas al ili.</p> <p>El tio sekvas amikeco gajema kaj ia sento pri unueco kultura. Britoj, francoj, germanoj, ĉinoj, danoj aŭ poloj estas fine nur homoj, ĉiuj kun similaj zorgoj. Kune oni ŝatus vivi pace. Kian kutimon disvastigas Esperanto, tio estas fidema egaleco kaj reciproka respekto: ĉiuj nacioj kun egala rajto, neniun trudanta sian lingvon al la ceteraj, sed ĉiu konservanta ĝin interne de siaj landlimoj.</p> <p>„Kio ĉefe impresas, skribis Inazo Nitobe, la japana senatano, kiu reprezentis la Ligon de Nacioj al pluraj Esperanto-Kongresoj, tio estas la unuanima kaj egaleca aspekto de tiaj kunvenoj pro la uzo de unu komuna lingvo neŭtrala.“</p> <p>El tiaj akiritaj kutimoj formiĝas novaj moroj de interpopola konduto. Sed la plej forta rezultato, sur tiu limigita kampo, estas la sento, kiu disvastiĝis.</p> <p>El sentoj vivas la homaro multe pli ol ĝi vivas el racia pripensado.</p>
---	---

Antologio XXI

Arthur Baur

Vicprezidinto de Svisa Esperanto-Societo

Kion la milito alportos al Esperanto? (1940)

En: *Svisa Espero*

Enkonduko:

Tiuj e-istoj, kiuj konsideras sin neŭtralaj, kutime malvolonte aŭ tute ne esprimiĝas pri politikaj demandoj. La svisa ĵurnalisto Arthur Baur (*1915), vicprezidanto de Svisa Esperanto-Societo en 1940, komence de la dua mondmilito kuraĝis esprimi kelkajn personajn konsiderojn pri la aspekto de la postmilita mondo kaj pri la rolo kiun Eo tiam verŝajne ludos. Kompreninte la karakteron de la nacisocialisma Germanio, Baur ne hezitis publikigi la opinion, ke Eo antaŭvideble pereos, se la Tria Regno venkos, dum ĝi certe plu vivos kaj ricevos novan ŝancon, se Anglio gajnos la militon. Ĉe tiu artikolo temas pri unu el la plej rimarkindaj kontribuajoj iam ajn aperintaj en *Svisa Espero*, periodaĵo de Svisa Esperanto-Societo.

Originala teksto (en Esperanto):

Ĉiu el ni esperantistoj sentas kaj spertas, kiel Esperanto suferas dum la nuna milito: la komunikoj estas interrompitaj, kongresoj neeblaj, komerco de Esperantaĵoj malhelpata, eldono de libroj tro riska, kolekto de internaciaj kotizoj barata. Mi konsolas nin per la penso, ke post la milito ni denove povos labori sur la internacia kampo kiel antaŭe, kaj ke se ni eltenas nun, la rekonstruo de la movado estos facile farebla. Sed ĉu ni ne trompas nin mem per tiu penso? Tial ni ekzamenu la eblecojn, kiujn Esperanto havos, kiam denove paco lasos nin labori en trankvileco. Prezentiĝas alternativo: Kio okazas, se Germanujo venkas? Kaj kio okazas, se Anglujo venkas?

Se Germanujo venkas, ĝi formos specon de Paneŭropo sub germana konduko. Kia tiu Paneŭropo aspektos kaj kiom da memstareco la unuopaj popoloj en ĝi ankoraŭ havos, ni ne povas prijuĝi, kaj tio nun ne

estas la temo; sed nin interesas, kiun rolon Esperanto povos ludi en tiu germana Eŭropo. Tiun demandon ni jam nun povas respondi kun certeco: neniun rolon. La gvidanta lingvo estos la lingvo de la venkinta popolo, t.e. la germana, kaj en iu grado la itala. La angla lingvo estos ekster konkurso kaj la franca kondamnita al negraveco. La germana registaro malpermesis en sia lando Esperanton samkiel ĉiujn aliajn internaciajn lingvoprojektojn (estas notinde, ke Esperanto ne malpermesigis ĉar ĝia aŭtoro estis judo, sed ĉar ĝi estas internacia komprenilo). Tiu malpermeso celis en unua linio malfortigi la internaciajn ligilojn de la germana popolo, sed en dua linio ĝi celis forigi konkuranton de la germana lingvo sur la monda kampo. La germana lingvo volas mem ludi la rolon de internacia lingvo kaj ĝi en la oriento de nia kontinento jam ege progresis en tiu direkto. Pro tio Esperanto ne havos lokon en la germana Eŭropo, kaj kiu kredas ke Esperanto foje denove estos permesata de la tria regno, nur montras pro tio sian profundan nekomprenon de la aspiroj de tiu regno. (Se Esperanto hodiaŭ posedas ankoraŭ iom da vivebleco en la de Germanujo konkeritaj landoj ekz. Nederlando, tio nur estas preliminaria ŝtupo; ne ĉiuj malpermesoj estas samtempaj, kaj se io hodiaŭ ankoraŭ havas rajton, tio ne sekurigos al ĝi la futuron.)

Nun la alia flanko. Supoze ke Anglujo venkas, kio okazos? La politika memstareco de la malgrandaj popoloj estos garantiata. Eble ili estos ankaŭ unuigitaj iel en paneŭropa federacio, sed en tiu federacio ne unu nacio estos sola gvidanto, sed ĉiuj partoprenos samrajte. Kompreneble tio estas nura supozo, ĉar la angloj kaŝas siajn planojn por la estonteco. Kompreneble la angla lingvo per angla venko akirus al si novan renomemon kaj fortigus sian rolon, sed Esperanto ankaŭ havus sian ŝancon. En Anglujo Esperanto nek antaŭ nek dum la milito estas malpermesata kaj nombras eĉ multajn adeptojn, do ĝi almenaŭ oficiale ne devas timi ion de la angloj. La diversaj nacioj de Eŭropo sentos post la milito pli ol iam la bezonon de kooperado kaj reciproka kompreno, kaj en tiaj cirkonstancoj Esperanto povos havigi al si la rolon, kiu al ĝi decas. Certa venko de la angloj ne garantias ion ajn al Esperanto, sed ĝi lasas al ĝi eblecon, dum ke venko de la germanoj certigas ĝian pereon almenaŭ en Eŭropo.

Ĉu la bezono de la aliaj kontinentoj, parte eĉ ne civilizitaj, sufiĉas por sukcesigi Esperanton ekster Eŭropo? Estus esperinde, sed kiu riskas ne dubi pri tio?

Estas ekster ĉi tiu kalkulo pri la futuro la ebleco, ke nek Germanujo nek Anglujo gajnas la militon, sed ke ili faros kompromison aŭ iu neatenditaĵo okazos. Pri tio oni hodiaŭ ne povas diri ion certan; kaj intence ĉi tie estas prezentitaj nur la du klaraj priskribitaj eblecoj. Povas ŝajni al iu la bildo de la estonteco ne klare vidata en ĉi tiu artikolo, bone, li verku artikolon por pruvi ke lia opinio estas pli ĝusta.

Sed kio gravas, estas ke ni formu al ni opinionon. Aŭ ĉu ni laboru plu metante la kapon en la sablon kaj ne pensante pri la futuro kaj ĝia influo, kiun ĝi havos por la fruktoj de nia laboro? Nun estas trankvila momento en nia movado, kiun ni utiligu por pripensi nian situacion.